No. 1.

# BULTENO

1934.
1. III.

## DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

Redakcio kaj administracio:
Praha XIX., Uralské nám. 447.
Telefona n-ro 718-41.

Redaktas:
Dr. ST. KAMARYT
Dr. A. PITLÍK

Senpage por membroj de
Ĉs. Asocio Esperantista.
Aperas sesfoje dum la jaro.

Invito al la

## XV. ĝenerala kunveno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista

okazonta en Praha dimanĉon, la 18-an de marto 1934
je la 8-a horo matene en kafejo Louvre, Národní tř. 20.

Programo:

1. Protokolo de la lasta ĝen. kunveno.
2. Raporto pri la agado kaj pri la kaso.
3. Raporto de la revizoroj.
4. Fondo de tutŝtata centro.
5. Elektoj por vakiĝintaj lokoj komitataj.
6. Liberaj proponoj. (Sendotaj ĝis la tria tago antaŭ la kunveno.)

La komitato.

Rimarko: Laŭ § 16-a de la statuto membroj ne povantaj ĉeesti persone, povas reprezentigi sin per iu ĉeestanto. — Laŭ § 17-a la kunveno estas decidrajta, se partoprenas almenaŭ kvarono de la membroj (persone aŭ reprezente). Se ne kunvenis tiu nombro, okazas post unu horo nova kunveno, kiu estas decidrajta sen atento de la nombro.

## Agado de ĈAE en jaro 1933.

(Raporto por la XV. ĝenerala kunveno).

Tiun ĉi raporton ni prezentas kun ia grado de emocio, kaj ni rekomendas ĝian atentan legadon al ĉiuj samideanoj en Ĉeĥoslovakio. La raporto estas konciza. Ofte sufiĉis citi paĝojn de nia Bulteno lastjara. Sed nia rekomendo de legado estas hodiaŭ ankoraŭ pli insista ol estis jarojn antaŭajn. El la raporto estas nekontesteble vidata nia laboro kaj nia daŭra kresko. Ne okazas io iom grava en nia lando, kie ni ne kunlaborus kiel gvidantoj kaj laborantoj samtempe. Tamen nia eksterregula kunveno la 9. XII. 1933 unuanime decidis deklari, ke ni estas pretaj disiĝi kaj eniri en novan Asocion, kunigontan ĉiujn esperantistojn en nia lando. Temas precipe, ĉu ĉiuj germanaj samideanoj volus kunlabori en la nove kreota Asocio kaj ĉu ankaŭ pluraj societoj kaj entreprenoj, starantaj ekster la sfero de centra organizo, volas enveni en la kreatan tutŝtatan asocion. Por ni estas tia reorganizo de la enlanda movado logika konsekvenco de la unuecigo internacia. Por faciligi la diskuton kaj decidadon ni verkigis projekton de statuto. Tiun taskon plenumis nia komitatano Jozef Friedrich el Košice kun rimarkinda sperteco. La principojn de la nova statuto, kiujn ni trovas ĝustaj kaj justaj, ni publikigis en la cirkulero dissendata de la Teritoria oficejo al ĉiuj atingeblaj adresoj kaj en raporto pri la eksterregula kunveno ĝenerala en B. p. 33. La cirkulero kunhavas balotilon; ĝia dissendo do estas speco de plebiscito inter esperantistoj en Ĉeĥoslovakio. Pri la rezulto ĝis nun atingita estas sube raporto de ĈD Sklenčka. La ciferoj ne estas definitivaj. Daŭre venas novaj respondoj. Ni ankaŭ korespondas kun multaj samideanoj, kiuj petas informojn pri detaloj. Tial ni povas raporti nur en la ĝen. kunveno pri definitivaj nombroj. Sed jam nun estas klare, ke nia iniciato trovis spontanean aprobon de multaj samideanoj de ĉiuj naciecoj en nia lando kaj ke ankaŭ laborantoj en la fakoj trovas ĝin efektiviginda.

# BULTENO

## DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

ENHAVO: Invito al la XV. ĝenerala kunveno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista. — Agado de ĈAE en jaro 1933. (Raporto por la XV. ĝenerala kunveno). — Financa raporto pri 1933. — Ĉu la esperantistoj en Ĉeĥoslovakio deziras la unuecigon? — Informoj. — Al ĉiuj! — Informaj tabuloj pri Esperanto.

1

**PRAHA, la 1-an de marto 1934.**

Aperas 6 foje dum la jaro. — Eldonanto: Svaz čsl. esperantistů v Praze XIX., Uralské náměstí 447. — Responda redaktoro: Fr. Slavík. — Presas A. Pražák, Jablonné n. Orlicí. — Gazettarifo permesita per ordono de Poŝt- kaj Telegraf-Direkcio en Praha, No 102.047-VII-1933.

## Ĉu la esperantistoj en Ĉeĥoslovakio deziras la unuecigon?

Komisiita de la porstatuta komisiono mi dissendis al ĉiuj samideanoj, kies adresoj estas al mi konataj la „unuecigajn kovertojn“. Konsiderante gravecon de la farota paŝo, ni volis aŭdi opinion de nia esperantistaro. Jen ciferoj laŭ stato 24. de Februaro 1934:

2.765 kovertojn ni dissendis; el ili
206 revenis pro malbona adreso, morto, seninteresiĝo de la ricevonto.

De 2.559 ni rajtas atendi deklaron ĉu favoran, ĉu negativan.

678 sendis deklaron favoran,
24 sendis deklaron negativan kaj
1.857 ĝis nun ne respondis.

La favoraj deklaroj montras jenan situacion:

| Sekcioj | M | MJ | MA | MS | Sume |
|---|---|---|---|---|---|
| ĉeĥa . . . . . | 217 | 80 | 167 | 8 | 472 |
| slovaka . . . . | 36 | 11 | 16 | 2 | 65 |
| germana . . . | 63 | 7 | 30 | — | 100 |
| hungara . . . | 3 | 4 | 7 | 1 | 15 |
| hebrea . . . . | 4 | 4 | 5 | — | 13 |
| pola . . . . . | 5 | — | 2 | — | 7 |
| karpatorusa . . | 3 | 1 | 2 | — | 6 |
| | 331 | 107 | 229 | 11 | 678 |

Tio signifas, ke 678 esperantistoj en nia lando deziras, ke estu fondita nova tutŝtata asocio. Multaj el ili akompanis sian deklaron per kuraĝigaj vortoj, el kiuj mi citas unu, la komunan: „Fine!“. La kunveno, okazonta en Praha la 18an de Marto povos tute senhezite meti la fundamentan ŝtonon al la nova konstruaĵo, en kiu ĉiu esperantisto de nia lando trovu sian hejmon. *O. Sklenčka.*

## Informoj.

**Atentigo por ĉeestontoj de nia ĝenerala kunveno!** La 17. III. 1934, sabate vespere okazos en Centra urba biblioteko (Praha I., Mariánské náměstí) parolado de hinda ĵurnalisto samideano Haĝi Mustafa Raden, kies temo estas: „Java Bali kaj Krakataŭ.“ Ekster-prahaj esperantistoj, kiuj ĉeestos ĝen. kunvenon kaj kiuj eble ne havos okazon aŭdi la prelegon de s-o Raden en sia loko, havas ĝin nun kaj aranĝos sian alveturon al Praha tiel, ke ili povu partopreni. — Esperantista Klubo Praha.

**Jubileo.** Faka instruistino Julie Šupichová, konata pionirino de la esperantista movado, festis la 27. I. 1934 sian 50-jaran naskiĝtagrevenon. Sinceran gratulon! (Pli detalan artikolon alportos la venonta numero.)

**Informaj tabuloj stacidomaj.** Novan kompletan nomaron de la stacidomoj, kie jam estas la tabulo, ni donos en iu venonta Bulteno. Hodiaŭ staru ĉi tie la laste erare pretervidita Mukačevo, kiu estis inter la unuaj mendintoj. Por plej bone lokita tabulo (pruvu per foto!) ni donos libran premion.

**Ĉeĥoslovaka numero de Literatura Mondo** estas valora dokumento pri uzo de nia lingvo por digna nacia propagando. Enhavo: prozo kaj poezio ĉeĥoslovakaj en majstraj tradukoj, studoj pri arto kaj literaturo, 16 ilustraĵoj. La numero estu en biblioteko de ĉiu ĉeĥoslovaka esperantisto; sendu ĝin ankaŭ al viaj eksterlandaj amikoj. Mendu ĉe ĈAE el la malgranda resto de la provizo 1 ekz. por Kč 6·—, sur luksa kreta papero por Kč 8·— afrankite.

**Ĉeĥoslovaka Antologio,** spegulo de nia kultura vivo, estos la ĉefa libro, kiun prezentas krom pluaj 9 valoraj libroj al siaj membroj nunjare AELA (la Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj) por la kotizo de sv. frankoj 21·90. Suma prezo por nemembroj sv. fr. 60·40. La kotizo estas akceptata ankaŭ en partopagoj. Aliĝon akceptas ankaŭ ĈAE.

**Filozofia vortaro.** Filozofia vortaro de D-ro St. Kamaryt, eldonita da Moraviaj Esperanto-Pioniroj, dokumentas la taŭgecon de esperanto por sciencaj celoj kaj la riĉecon de la esp. vorttrezoro. La vortaron liveras por 28·— Kč afrankite la oficejo de ĈAE.


## Mendu, uzu kaj disvastigu la eldonaĵojn de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista:

Bouška, *Krátký kurs esperanta* . . . . . Kč —·50
*Ŝlosilo,* ĉeĥa . . . . . . . . . . . . . . . „ —·60
„ slovaka . . . . . . . . . . . . „ 1·—
Šupichová, *Rádce českého esperantisty* . . „ 2·30
Collinson, *Esperanto a jeho kritikové* . . . „ 2·—
*Afiŝoj,* sur maldika papero, 1 ekz. . . . . „ 1·70
sur kartono . . . . . . . . . . „ 2·—
Bouška, *Esperanto—jednotné jazykové pojítko národů,* 100 ekz. . . . . . . . . . . „ 7·—
Ginz, *Jeden jazyk pro celý svět,* 100 ekz. „ 20·—
*Poŝtkartoj kun skizo de mapo de Ĉeĥoslovakujo,* 100 ekz. . . . . . . . . . . . „ 15·—
*Ĉeĥoslovaka numero de Literatura Mondo* . „ 6·—
„ „ „ luksa eldono „ 8·—
*Praha,* ilustrita gvidfolio . . . . . . . . „ 1·—
*Unua slovaka kristana princo* . . . . . . „ 1·—

Al indikitaj prezoj aldonu 10% por ekspedkostoj. Konto de poŝta ŝparkaso 9.602 Svaz čsl. esperantistů, Praha XIX., Uralské nám. 447.

Tial ni ankoraŭ unu fojon petas: legu nian raporton atente kaj meditu, kiom oni povus fari, se ĉiuj fortoj de la movado en nia lando laborus kiel aŭtonomiaj eroj en unusola centra asocio.

**1. Konsisto de la komitato.** La komitato elirinta el balotado de la ĝenerala kunveno dividis la funkciojn en la unua sia kunveno 28-an de marto 1933. La listo rezultinta estas sur la p. 6. Divido de la laboro inter la diversajn anojn montriĝis tre taŭga. Sperto de la pasinta jaro estas, ke kreskas intenseco kaj amplekso de laboro, kiun dediĉas al niaj taskoj ĉiam pluraj anoj. Kreiĝis efektive areto de homoj, kiuj dediĉas sian tutan liberan tempon al laboro por esperanto en kadro de nia Asocio. Tiu fakto estas tiom grava kaj ĝojiga samtempe, ke meritas esti dirita tie ĉi. Krom la komitatanoj meritas esti nomita tie ĉi nia ano O. Ginz, kiu plenumas daŭre taskojn de gvidanto de du komisionoj kaj trovas krome tempon por efektivigi ankoraŭ aliajn laborojn gravajn. Sen rezulto restis nia alvoko, ke anoncu sin bonvolaj kunlaborantoj, kiuj volus akcepti administron de Ekspozicia materialo kaj fondon de Asocia arkivo. Ni ripetas hodiaŭ denove tiun peton.

**2. Komitataj kunvenoj** estis 8. Ĉiujn prezidis nia vicprezidanto dr. Pitlík. La kunlaboro de komitatanoj estis tre kontentiga. Ankaŭ la ekster-prahaj anoj kunlaboris efike, de la prezidanto kaj kasisto venis por ĉiu kunveno leteroj kun raportoj kaj proponoj. Ankaŭ tiun ĉi jaron estis sendataj kopioj de protokoloj al ĉiuj neĉeestintaj komitatanoj. Tiun laboron plenumadis regule sekretariino Tarantíková.

**3. Membraj kunvenoj** ne okazis tiun ĉi jaron. Pri eksterregula ĝen. kunveno ni raportis sur p. 33. Ĝia preparo kaj ĝiaj decidoj signifos certe gravan paŝon por unueciĝo de la enlanda movado. Al regionaj kunvenoj kunvokataj de Teritoria oficejo (Bernartice), de Regiona Esperantista Ligo en Český Těšín kaj de Amika rondaro de esperanto en Teplice-Šanov ni sendadis regule leterojn salutajn kaj informajn por turni atenton de samideanoj al aktualaj taskoj kaj problemoj de la movado. Niaj komitatanoj ĉeestis en Bernartice (Sklenčka) kaj en Horní Litvínov (Šustr, Staněk).

**4. Administrado.** La divido de la laboroj en komisionojn, kiu montris sian utilecon jam dum pluraj jaroj, estis konservita. Ekzistis komisionoj por jenaj taskoj kaj kun jenaj estroj: Administro de membroj (Sklenčka), Financoj (Sklenčka), Gazeta servo (Ginz), Radio (Ginz), Literaturo (Hromada), Redakto de Ĉeĥoslovaka antologio (Hromada), Turismo (Pitlík), Ekspozicia materialo (Šustr), Junularo (Echtner), Eldonado de Bulteno (Pitlík, Kamaryt, Slavík), Lernejo (Kamaryt), Sciencistaj aferoj (Kamaryt), Oficejo (Slavík). Gravan taskon plenumas en nia administrado nia honora oficejestro, Slavík, kiu zorgas pri akcepto de korespondaĵoj, dissendo de ili al taŭgaj adresoj, respondo al kurantaj demandoj, faras plejparton de cirkuleroj, dissendas ilin, ekspedas la Bultenon. — Por daŭra kresko de nia korespondado ni aĉetis duan skribmaŝinon, uzitan ekzempleron Continental, kiun por tre akceptebla prezo prizorgis Ginz. Unu maŝino estas ĉe ĝen. sekretario, la dua ĉe la prezidanto. Nia multobliga aparato estas ĉe sekretario Slavík.

Da leteroj ni forsendis dum la pasinta jaro sume 1475, da presaĵoj 3257. En tio ne estas kalkulitaj ekzempleroj de nia Bulteno. Koncernaj nombroj el la jaro 1932 estas 1481 leteroj kaj 2157 presaĵoj. La kresko de la ciferoj pri la presaĵoj estas vidigilo, kiom kreskas amplekso de nia agadsfero kaj intenseco de nia laborado.

Bezono de profesia oficisto por nia laboro estas daŭre pli urĝa. Tamen la enspezoj ne kreskas tiom, ke ili faciligus tian solvon, kvankam ĝi estas baldaŭ efektivigota, ĉar la funkciuloj ne povos daŭre labori tiom streĉite. Por prepari eblecon por laboro de pagata oficisto, ni klopodas starigi en Praha taŭgan ejon, en kiu li laborus. Nia komitato plurfoje traktis pri proponataj eblecoj, tamen ankoraŭ neniu estis trovita taŭga. Por posedi kapitalon por ekipi la ejon per meblo kaj maŝinoj ni fondis en antaŭa jaro apartan oficejan fondaĵon kaj dum tiu ĉi jaro ni malfermis publikan kolektadon. La rezulto estas tie ĉi publikigata. La plej grandan sumon dediĉis por tiu ĉi celo Esperanto-klubo en Bratislava (300 Kĉ), kiu meritas dankon ankaŭ sur tiu ĉi loko.

Ĝis nun enkasigis la fondaĵo oficeja

| | | | |
|---|---|---|---|
| en j. 1932 de Fr. Slavík en Praha | . . . | Kĉ | 50·— |
| Růžena Herzigová en Praha | . . . | „ | 10·20 |
| en j. 1933 de laŭ-regula doto el Asocia kaso | | „ | 400·— |
| D-ro Stan. Kamaryt en Bratislava | | „ | 50·— |
| M. Weisskopf en Praha | . . . . . | „ | 32·— |
| Esperantista societo en Přerov | . . | „ | 45·— |
| Esperantista klubo en Košice | . . | „ | 50·— |
| Jozefo Friedrich en Košice | . . . . | „ | 10·— |
| 31. XII. 1933 estis sumo de ĝiaj enspezoj | | Kĉ | 647·20 |

La sumo estas evidente malgranda kaj, eĉ se oni alkalkulas la aprobitan donacon el Bratislava kaj la dotaĵon el la kaso en la venonta ĝenerala kunveno, tute nesufiĉa. Ĉu ni estas tro postulemaj, atentigante denove pri la kolekto kaj petante precipe la kunvenojn de esperantistoj, ke ili entreprenu kolekton inter la unuopaj anoj? Ni ripetas, ke ni kredas pri la guto malgranda, do ke ni volonte akceptas kaj kvitancas eĉ la plej malgrandajn sumetojn. Kaj ni ankaŭ ripetas, ke ofte ni aŭdas de niaj membroj konsilojn tuj dungi profesian oficiston por la Asociaj laboroj. La unua kondiĉo estas posedi por li ejon. Ŝajnas al ni, ke tia meditado devas nepre alkonduki al pli da aktiveco por la kolektado.

**5. Ekspozicia materialo** (komision-estro J. Šustr). La stato restis dum la jaro sen ŝanĝoj raportindaj. La novan estron ni ne sukcesis trovi spite pluraj provoj. La materialo estis pruntita por ekspoziciado en urbojn Mladá Boleslav, Ostrožské Před-

městí, Trnava, Uherské Hradiště. Al Pola E.-Klubo en Krulewská Guta (Pollando) ni donacis laŭ ĝia peto kolekton de propaganda materialo.

**6. Informado pri esperantistaj entreprenoj** en nia lando estis en tiu ĉi jaro pli kontentiga ol jarojn pasintajn. Krom la ĝenerale kreskanta aktiveco de nia movado kaŭzas certe ankaŭ nia zorgo pri korespondа kontakto kun la aktivuloj en la tuta lando. Estas ĝojige superrigardi kronikon en nia Bulteno, kie ni klopodis pri la kompleteco, kvankam ni ankoraŭ ne atingis ĝin. Ni redonas tie ĉi la liston de lokoj, pri kiuj ni povis raporti: Bakov n. J., Bernartice, Betliare, Bílina, Bor, Bratislava, Břešťany, Brno, Česká Kamenice, Česká Lípa, České Budějovice, Český Těšín, Cvikov, Děčín, Freudenberg, Frýdek, Fryštát, Hluk, Holešov, Horní Litvínov, Hradec Králové, Jablunkov, Jaroměř, Jičín, Karvinná, Kolín, Košice, Krnov, Lázně Bělohrad, Liberec, Lom u M., Mariánské Hory, Mariánské Lázně, Mikulov, Mladá Boleslav, Moravská Ostrava, Nový Bohumín, Nymburk, Orlová, Pardubice, Písek, Plzeň, Podmokly, Postoloprty, Praha, Prostějov, Radvanice, Rimavská Sobota, Röhrsdorf, Rychvald, Slezská Ostrava, Staré Město, Šumperk, Svitavy, Teplice-Šanov, Tisovec, Třebíč, Trnava, Trnovany, Uherské Hradiště, Uherský Brod, Ústí n. L., Vodňany, Železník. Sume 66 lokoj. Lastan fojon ni faris tian nomaron pri la jaro 1931. Tiam enestis 44 lokoj. La ĉi-jara nombro estas rimarkinde pli alta. Tamen ĝi ne estas kontentiga. Ekzistas ankoraŭ tre multaj lokoj en nia respubliko, el kiuj devus veni raportoj pri aktiveco de esperantistoj. Ni uzos tiun ĉi nomaron por turni nin al samideanoj en lokoj mankantaj en ĝi kaj instigi ilin al signoj de ilia esperantista vivo.

**7. Varbado de la membroj** signifas ĉe ni ne la kolektadon de kotizoj, sed unu el la plej ĉefaj taskoj de nia celado. Ĉar ĝi signifas enigi esperantistojn en organizitan movadon, kiu sola ebligas efektivigon de nia idealo. La decido de la lasta ĝen. kunveno malaltigi la kotizon por la anoj de korporacie aliĝintaj lokaj grupoj signifas gravan momenton en Asocia vivo. Komitatano J. Friedrich bonvole akceptis taskon organizi korporaciajn aliĝojn. Rezulto de la persista agado estas, ke ĝis nun aliĝis korporacie lokaj kluboj en lokoj: Bakov n. J., Bratislava, Hradec Králové, Holešov, Kolín, Košice, Lázně Bělohrad, Lom u M., Mladá Boleslav, Praha, Přerov, Prešov, Prostějov, Tisovec. Sume kluboj en 14 lokoj. En j. 1934 decidis aliĝi E.K. en Brno, E.K. Jaroměř kaj Kulturklubo en Brno. Estas tre espereble, kaj ni rajtas atendi, ke ankoraŭ ceteraj grupoj baldaŭ trovos utila aliĝi al ni korporacie. Jam en la unua jaro de ekzisto de tiu aranĝo vidiĝis atentinda kresko de membro — nombro, kiel estas videble en la statistika tabelo pri la membraro. Cetere helpis al tiu kresko, ankaŭ la intima kunlaboro de Teritoria oficejo kaj ordo en administro de la membroj. Pluraj komitatanoj (Friedrich, Kamaryt, Dro Pitlík, Sklenčka) uzis siajn privatajn aŭ libertempajn vojaĝojn por kontakti kun diversaj samideanoj kaj persone ilin informi pri aktualaj taskoj de la movado. Certe estas ĝojiga simptomo pri nia vivokapableco, ke nombro de niaj anoj kreskas dum tiu ĉi tempo, kiam ĉiu rakontas pri krizo kaj kiam salajroj de dungitoj estas malaltigataj.

**8. Administrado de la membroj (komisionestro Sklenčka).** Jen kelkaj ciferoj, kiuj montras konsiderindan kreskon de la membraro kompare kun la pasinta jaro:

| | |
|---|---|
| 1 | honora membro |
| 3 | dumvivaj membroj |
| 470 | membroj pagintaj en 1932 kaj 1933 por 1933 |
| 31 | membroj de la Studenta Sekcio pagintaj por 1933 |
| 505 | stato de membroj 1933 la 31. decembro 1933 |
| 369 | stato de membroj 1932 la 31. decembro 1932 |
| 136 | kresko t. e. 36·9%. |

Laŭloka divido de la membroj:

(La ciferoj inter krampoj montras la nombron de la korporaciaj membroj pagintaj po Kč 10·—.)

| | | |
|---|---|---|
| 102 (74) | en | Praha |
| 26 (24) | en | Hradec Králové |
| 23 (21) | en | Kolín |
| 21 (18) | en | Mladá Boleslav |
| 20 (19) | en | Košice |
| 17 (—) | en | Bratislava |
| 14 (12) | en | Lázně Bělohrad |
| 13 (6) | en | Brno |
| 13 (13) | en | Prostějov |
| 12 (11) | en | Bakov nad Jizerou |
| 11 (8) | en | Tisovec |
| 8 (8) | en | Holešov |
| 8 (8) | en | Lom u Mostu |
| 8 (7) | en | Přerov |
| 8 (8) | en | Prešov |
| 6 (—) | en | Olomouc |
| 5 (—) | en | Pardubice |
| 4 (—) | en | Plzeň |
| 3 (—) | en | Jičín |
| 32 po 2 | en | Bystřice pod Hostýnem, Jaroměř, Jablonné nad Orlicí, Kladno, Komárno, Lazy, Lubná u Litomyšle, Mukačevo, Nymburk, Přelouč, Rumburk, Soběslav, Stará Boleslav, Trnava, Trenčín kaj Užhorod |
| 120 po 1 | en | 120 malsamaj lokoj de nia lando |
| 474 (237). | | |

Studenta Sekcio:

| | | |
|---|---|---|
| 9 | en | Praha |
| 5 | en | Košice |
| 4 | en | Bakov nad Jizerou |
| 13 | en | 13 malsamaj lokoj de nia lando |
| 31 | | |

Ni atentigas, ke statistigitaj estas nur la membroj, kies kotizon por 1933 ni ricevis antaŭ fino de la jaro.

**9. Publikiga agado.** Laŭ decido de nia lasta ĝen. kunveno ni komencis eldonadi nian Bultenon

memstare, 6 foje dum la jaro. La membroj ricevas ĝin senpage. En tiu ĉi jaro aperis 5 numeroj (40 paĝoj), ĉar kiel la sesan ni kalkulis la nron 49 de la Bulteno laŭ malnova sistemo, kiun ankaŭ ricevis ĉiuj niaj membroj, kiel invitilon por la ĝenerala kunveno. La Bulteno kostis sume 3180 Kĉ. Komparante tiun sumon kun la sumo pagita laŭ malnova aranĝo Kĉ 2637 ni trovas, ke la diferenco ne estas tro granda, ne parolante pri la pli granda amplekso de la nuna „Bulteno". La membraro tre ŝatas tiun aranĝon kaj diversaj niaj anoj plurfoje esprimis sian kontentecon. La Bulteno enhavas sole organizajn informojn kaj alvokojn. Tial ĝi ne konkurencas kun La Progreso kaj Ligilo, kies legadon kaj abonon ni ĉiam rekomendas al nia membraro. La Bultenon redaktas Dr. Pitlík, Dr. Kamaryt, Slavík.

Krom la Bulteno ni eldonis prese:

Bulteno nro 49 kun raporto pri agado en 1932 (1000 ekz.)

Legitimilo por transdono de balotrajto en ĝen. kunveno (1000 ekz.)

Konfirmilo pri kotizpago (2000 ekz.)

Cirkulero-mendilo por stacidomaj tabuloj (300 ekz.)

Folieto pri „Monkolektado por Oficeja fondaĵo" (200 ekz.)

Regularo pri ekzamena fondaĵo (100 ekz.)

Cirkulero pri enlanda unuecigo (3000 ekz.).

La dua eldono de la slovaka ŝlosilo estas preparita kaj la teksto, kontrolita de P. Rosa kaj Kamaryt, iros baldaŭ presejon. Por slovaklingva eldono de flugfolio „Jedon jazyk pre celý svet" ne venis ankoraŭ nombro de antaŭmendoj almenaŭ iom sufiĉanta. Manuskripton de slovak-esperanto vortaro havas pretan aŭtoro, kun kiu ni traktas pri eblecoj de eldono ĉe iu eldonejo profesia.

Ciklostilitajn cirkulerojn ni eldonis 24 (en antaŭa jaro 20). Sumo da paĝoj estis 29 (en antaŭa jaro 25). El tio estas de la Gazetara servo 10 paĝoj. La plej granda eldoncifero de la cirkulero estis 200 ekz., la plej malgranda estis 33. La sumo de la dissenditaj ekzempleroj estas 2249. Ke oni ne atingis la sumon de la jaro antaŭa (4046), sekvas el tio, ke ni turnas nin nun sole al adresoj, kiuj respondas al niaj alvokoj almenaŭ de tempo al tempo. Ankaŭ estas en tiu ĉi fakto videbla la kribro en la adresaro de kunlaborantoj de la gazetara servo.

**10. Kontakto kun ĉsl. oficialaj aŭtoritatoj.** Ni zorgis, ke la gravaj lokoj estu informitaj pri ĉiu iom grava uzo de E. en sfero, kiu ilin interesas. Ni informis ministerion por fremdlandaj aferoj pri rezulto de apero de la ĉeĥoslovaka numero de la Literatura mondo kaj pri uzo de esperanto por diskonigo de la Pribina-festoj. — Al ministerio fervoja ni transdonis diagramon pri organizo de japanaj fervojoj, kiun ni ricevis de Japana Esperantista Ligo Fervojista en Tokio. — Entrepreno de Stacidomaj tabuloj postulis plurajn petskribojn kaj personajn intervenojn ĉe la fervoja ministerio. Ili estis faritaj kaj verkitaj de Ginz. — Ankaŭ la prelegvojaĝoj de Ajayi kaj Raden kaŭzis bezonon kontakti kun publikaj aŭtoritatoj precipe de malpli altaj instancoj. Tiu kontakto estis relative tre vigla, kaj ĝi estas bona pruvo, ke turni sin al aŭtoritatoj kun konkretaj petoj kaj bezonoj efikas ofte pli ol simplaj teoriaj alvokoj kaj memorandumoj. La ministerio por eksterlandaj aferoj plurfoje turnis sin al ni petante informojn pri diversaj priesperantaj aferoj. Plej ofte respondis tiajn demandojn (ofte ankaŭ telefonajn) dr. Pitlík.

**11. Kontakto kun nia centra organizo.** La pasinta jaro estis sub influo de brua, ofte pasia, disputo pri reorganizo de la internacia movado, kies celo estis proklamata la unuecigo. Ni de komenco deklaris nian konvinkon, ke la atingebla celo ne valoros perdon de la tempo kaj laboro, sed nia opinio ne estis tro atentata. Nia ĝenerala kunveno en Hradec Králové esprimis koncize nian opinion pri la reorganizo en la rezolucio, kiun ni dissendis al ĉiuj kompetentaj lokoj. Ni korespondis pri detaloj kun multaj interesatoj kaj klopodis ĉie helpi al senpasia diskuto de la problemoj. Por la kongreso en Kolonjo komisiis la komitato la prezidanton kiel delegiton. Sed li ne povis la kongreson partopreni parte pri personaj malfacilaĵoj, parte pro konvinko, ke ne taŭgas por Ĉeĥoslovako ĉeesti solenan manifeston en la lando, kie preskaŭ samtempe prenas la tutan politikan potencon la partio, kies gvidantaj pensuloj deklaris plurfoje sian tendencon influi nian politikan situacion en senco kontraŭ al niaj idealoj kaj konvinkoj. La kongreso Kolonja sukcesis starigi principojn de unueca organizo, el kiuj rezultis reorganizita UEA, kiel unusola organizo internacia de la movado. Ĝi de nun plenumas samtempe la taskojn de la organizo de propagando kaj reprezento, kiuj antaŭe apartenis al la ICK kaj la taskojn de praktika uzado, por kiuj estis UEA siatempe fondita. La delegitoj transprenas krom la servoj ankoraŭ taskojn, rezultantajn el la ĝenerala movado. Por ni estas evidenta devo, kunlabori en la nova sistemo same disciplinite, kiom ni laboris en la sistemo malnova. Ni plenumis promeson de nia rezolucio pagi kotizon al estinta KR post fino de la disputo, kaj ni sendis la koncernan sumon al ĝia kasisto en fino de j. 1933. Ni anoncis taŭgatempe nian aliĝon al UEA kiel kunfondinto, kaj aligis kiel membroj ĉiujn niajn anojn. Por aprobo de tiu ĉi aliĝo ni kunvokis eksterregulan ĝeneralan kunvenon. Sed ni informis centran oficejon de UEA ankaŭ pri la fakto, ke la kunveno decidis provi fondon de unusola asocio en nia lando, kiu kunigus ankaŭ la germanajn samideanojn, ĝis nun organizitajn en GEL, kaj ni proponis al GEL trakti pri fondo de tiu nova asocio, kiu povus kunigi ankaŭ diversajn grupojn kaj instituciojn, kiuj estas sole parte organizitaj. — Kun la UEA-sekcio de eksteraj aferoj ni ko-

respondas pri diversaj aferoj. La kontakto el nia flanko ne povis esti tiom ofta, kiom ni estus dezirintaj, ĉar mankis al ni la tempo, kiun forrabis korespondado kaj traktado pri reorganizo. Ni nun ĝojas, ke la aferoj venis en novan ordon kaj ke la pozitiva laboro ekmarŝis al atingeblaj konkretaj celoj. — Nia ano Dr. P. Dolák estas dum pluraj jaroj patrono de ICK, pro kiu oferemo li meritas specialan dankon. — Pro sia 25-jara jubileo elektis UEA en Kolonjo honorajn membrojn, inter kiuj estas el nia anaro s-ro: Hromada, Dr. Pitlík, Šupichová, Sklenčka.

**12. Kontakto kun la ceteraj naciaj societoj.** Kun GEL ni estis en daŭra kontakto sendante al ĝi niajn cirkulerojn kaj Bultenon, kaj korespondante pri kurantaj aferoj. Detale ni korespondis pri reorganizaj diskutoj kaj venis al la sama opinio. La kunveno de la ambaŭ komitatoj ne okazis ankoraŭ, ĉar oni trovis pli taŭga pli frue solvi principajn demandojn, ĉu la ambaŭ asocioj interkonsentos principe pri bezono fondi novan unusolan asocion por la tuta respubliko. — Ni ankaŭ tiun ĉi jaron dissendis kun scio de ICK nian raporton pri agado al ĉiuj naciaj societoj. La resono estis pli granda ol jaron pasintan. Venis konfirmoj aŭ sendoj de iliaj raportoj de jenaj naciaj societoj: Argentina, Aŭstria, Belga, Brazila, Brita, Estona, Franca, Germana, Hungara, Itala, Japana, Nederlanda, Pola. Sveda. Ni dankas al ĉiu respondinta asocio. La studo de ricevitaj dokumentoj estis al ni tre utila por komparo kaj instigo pri taskoj kaj metodoj. Ni dissendos ankaŭ tiun ĉi raporton al ĉiuj naciaj asocioj, invitante ilin helpi per interŝanĝo de la raportoj al reciproka uzo de la spertoj. — Ni povis respondi al pluraj gravaj demandoj de naciaj asocioj. Al la Sveda E. Federacio kaj al la E. Asocio de Estonio ni donis detalan informon pri oficiala instruado de es-po en nia lando. La Nederlandan LEEN ni informis pri publikjuraj ekzamenoj pri esp-o ĉe ni. Kun Laborista E.-organizo en Nederlando ni estis en rilato per nia Gazetara servo. Al la komitato de UK en Stockholm ni donis informojn pri eventuala vojaĝo de la teatra trupo kongresa tra nia lando. De la Sveda federacio ni ricevis rezulton de ĝia enketo pri oficiala instruado en la mondo en la lastaj du jaroj; ni tre sincere dankas al la samideana asocio pro afabla plenumo de nia peto. Hungarlanda E.-Societo per speciala decido de la komitato rekomendis al siaj anoj baloti por eldono de Ĉeĥoslovaka antologio en enketo de AELA por 1934. — Nia prezidanto kaj vicprezidanto estis detale informataj de projektantoj de la Viena konferenco 1934 pri preparaj laboroj. Ili uzis siajn vizitojn en Wien kaj viziton de s-ro reg. konsilisto Steiner en Bratislava por detale priparoli kun li kaj s-ro kalkulkonsilisto Frey la diversajn proponatajn aranĝojn. — Al Internacia E.-Muzeo en Wien ni sendis kelkajn dokumentojn. — Ĉar la traktado pri la internacia reorganizo ĉe pluraj observantoj vekis impreson, ke oni ne atentas sufiĉe opiniojn de la naciaj asocioj de la malpligrandaj nacioj, ni simpatie studis ideon de samideano Nikolao Hovorka el Wien pri fondo de labor-komuneco inter malgrandaj nacioj. Ni turnis nin al asocioj Aŭstria, Hungarlanda, Jugoslava, Rumana petante ilin pri ilia opinio. De ĉiuj ni ricevis aprobajn deklarojn, el kiuj rezultas, ke ili estus pretaj al komunaj paŝoj en aferoj de internacia signifo. Sed konkretaj paŝoj montriĝis intertempe nebezonaj, ĉar evoluo de diskuto pri unueciga reorganizado nin finfine kontentigis ĉiujn. Tamen ŝajnas al ni la ideo atentinda; ni klopodos, ke la rilatoj inter ni kaj niaj najbaroj estu laŭ ebleco plej vivaj. — Dr. Pitlík uzis sian vojaĝon en Amerikon por kontakti kun diversaj esp-istaj societoj kaj unuopaj esp-istoj en Eŭropo kaj Usono kaj informi ilin pri nia vidmaniero koncerne la aktualajn problemojn.

**13. Lernejaj aferoj** (komision-estro Kamaryt). La lecionoj de la lektorato en ĉsl. teknika altlernejo en Praha daŭras (lektoro dr. Pitlík). Oficiala instruado kial nedeviga fako en duagradaj kaj fakaj lernejoj estas ankoraŭ malpli ofta ol estis antaŭ jaro. Nepre estas bezone revivigi en venonta jaro pli intensan uzadon de la ekzistantaj permesoj. La afero ne estos facila, ĉar la lerneja administro nun intence malfaciligas ricevon de la permesoj.

Por provi ŝanĝon en sintenado de la lernejaj aŭtoritatoj preparis la komisionestro detalan memorandumon, ripetantan ĉiujn argumentojn por oficiala instruado de Esperanto, kaj ni prezentos ĝin baldaŭ al la lerneja ministerio.

La institucio de la publikjuraj ekzamenoj daŭras. Dum la jaro estis nomita nova komisaro en Brno s-ro R. Chlup, faka instruisto.

**14. Ĝenerala propagando.** Propaganda semajno aranĝata samtempe kun GEL fariĝis daŭra entrepreno kaj ĝia resono estis tiun ĉi jaron pli forta ol la jaron antaŭan. Precipe rimarkinda estas la fakto, ke ni ricevis informojn pri efektivigo de la rekomendataj aranĝoj el 2—3 lokoj, el kiuj venadis tre malofte iaj signoj de aktiveco. — La kresko de esp-ista aktiveco kaŭzis ankaŭ kreskon de publikaj kursoj. Ni provis fari statistikon laŭ sciigoj enskribitaj en la Bulteno, ĉar ni klopodis, ke ĝi atingu almenaŭ relativan kompletecon. Laŭ ĝi oni instruis en nia lando dum la jaro 1933 en 46 publikaj kursoj en 36 lokoj esperanton al 1080 komencantoj. Lastan fojon faris tian statistikon ĝen. sekretario Hromada pri la j. 1926. Li trovis tiam preskaŭ la samajn ciferojn. En j. 1926 estis instruitaj en 50 kursoj en 37 lokoj ĉirkaŭ 1000 personoj. La diferenco inter jaroj tiama kaj la nuna estas okulfrape malgranda nombro da kursanoj en ĉiuj niaj grandurboj (Praha, Brno, Bratislava, Plzeň). Eble ĝi estas hazardo, eble ĝi estas signo, ke por la grandurboj oni nun devas apliki aliajn metodojn de pro-

pagando ol estas la publikaj kursoj. — Ni organizis disvendon de la ĉeĥa ŝlosilo kun la flugfolio Jeden jazyk po 1 Kĉ afrankite, publikigante koncernajn alvokojn en multaj gazetoj kaj donacante la du presaĵojn al redaktoroj de semajnaj gazetoj. Eĥo de tiu entrepreno estis tre kontentiga. Venis ĝis januaro 1934 sume 90 mendoj, kvankam la agado nur komenciĝas. — Da flugfolio Pojítko ni disvendis kaj disdonis sume ĉ. 4000. La provizo de la 7-a eldono estas elĉerpita. La novan eldonon ni intencas aperigi en iom pli luksa tipografia aranĝo. — Ni zorgis pri ĝenerala disvendo de la ĉeĥa ŝlosilo por ebligi aperon de nova eldono laŭ normo de UEA. — Kolektado de adresoj de interesantoj, pri kiu ni daŭre insistas, havas nun pli kontentigajn rezultojn, ol kiam ni komencis kun nia insistado. Pluraj samideanoj jam sendas ilin sen plua urĝigo. Posedo de tia adresaro ebligis, ke niaj presaĵoj kaj alvokoj atingis homojn novajn kaj ke diversaj pozitivaj respondoj ebligos junigadi niajn vicojn. — D-ro Pitlík uzis plurfoje siajn publikajn prelegojn pri la Chicaga ekspozicio por aludi ĉe komenco de la prelego pri Esperanto. — Niaj flagoj ne estis dum la jaro uzitaj. Ili estas ĉe sekretario Slavík.

**15. Propagando per gazetoj** (komisionestro Ginz) estas daŭre organizata de la Gazetara Servo. La jaro 1933 signifis por ĝi rimarkindan sukceson. Plimultiĝis la nombro de ĉeĥoslovakaj gazetoj, kiuj alportas sciigojn pri niaj lingvo kaj movado kaj forte (je triono) kreskis la nombro de la artikoloj aperintaj. Jen la ciferoj (inter krampoj rezultoj el 1932):

| gazetoj | | | artikoloj |
|---|---|---|---|
| 80 (77) | en Praha . . . . . . . . | kun | 578 (467) |
| 59 (65) | „ cetera Bohemio . . . . | „ | 354 (229) |
| 61 (48) | „ Moravio-Silezio . . . . | „ | 310 (212) |
| 28 (24) | „ Slovakio kaj Subk. Rusio | „ | 332 (141) |
| 10 (13) | „ ĉeĥoslov. ekster Respubl. | „ | 16 (40) |
| 238 (227) | gazetoj | kun | 1590 (1089) |

Konsiderataj estis sole artikoloj, kiuj venis antaŭ niajn okulojn. Ni klopodas starigi por grava uzo de plej diversa speco centran kolekton pri ĉiu nin koncernanta voĉo de ĉeĥoslovaka gazetaro. Ni direktas tial novan peton al niaj membroj, ke ili helpu fari ĝin kompleta. Ĉesu jam la malgrandaj kolektoj de iuj niaj kunlaborantoj kaj de iuj grupoj kaj sufiĉu por ili simpla notado, se estas ie intereso pri loka statistiko. — Per speciala aranĝo serĉas G. S. inter la gazetaj legantoj personojn interesiĝantajn pri nia lingvo kaj liveras al ili informan materialon. — Por kontroli kaj laŭeble pliriĉigi sian adresaron, direktas G.S. nunjare novan alvokon al la membraro.

**16. Propagando en fakaj rondoj.** Propagando inter skoltoj, por ke el nia lando venu al la ĵamboreo en Hungarlando 1933 inda nombro de skoltoj parolantaj esp-on, havis kompare kun la aliaj landoj bonan sukceson. Por propagandi inter la skoltoj ni pagis aldonigon de 3000 ekz. de Pojítko al unu numero de ilia ĉela gazeto Skaut-junák. Estas interese konstati tie ĉi, ke venis nek unu informpeto. La Esperanto-fako de Centro de slovakaj katolikaj skoltoj aranĝas tendaron de la Skolta Esperantista Ligo en meza Slovakujo dum dua duono de julio 1934. La aferojn gvidas samideanoj Macek kaj Kiss. Ni subtenos la entreprenon laŭ nia povo kaj esperas, ke la esperantemo de skoltoj ankoraŭ pli kreskos. — Ĉe Foiro de Praha ni ne sukcesis revivigi ĝian intereson pri uzo de esp-o. Male prezidanto de GEL samideano inĝ. prof. Scholze sukcesis instigi la foiron de Liberec por baloti en Internacia Foira Unio por esp-o. — Kun Mezeŭropa instituto en Brno ni klopodis konservi la kontakton per korespondado. — Ni restas membro de konsilantaro de etikaj movadoj en Ĉeĥoslovakio. — Kun Katolika ligo ni estis en daŭraj rilatoj. — Al la Laborista ligo ni proponis uzon de nia Bulteno; la traktado daŭras. — Firmao Pála a spol. en Slaný nomigis novan tipon de sia elektra baterio por poŝlampoj Esperanto-Palaba. Ni diskonigos tiun fakton laŭ ebleco.

**17. Propagando fremdlanden.** Ni konfirmadis zorge ricevon de ĉiuj al ni venintaj esperantlingvaj propagandaj presaĵoj turismaj, komercaj kaj ideaj. — Ni sukcesis, ke Lyona foiro kaj Porfremdula asocio en Bratislava interŝanĝis la afiŝojn por elpendigi ilin en siaj ejoj. — Al Beograda E.-societo ni sendis laŭ ĝia peto informon pri ŝako kaj esperanto.

**18. Kola — Ajayi — prelegvojaĝo** meritas apartan alineon. Detala raporto pri ĝi estas en B. sur p. 20. Oni vidas el ĝi, ke aŭdis le simpatian nigran parolanton 10.600 homoj en 20 lokoj. Ĝi estas faro tre grava propagande, ĉar la publiko vidas ne predikon por internacia lingvo, sed efikan aplikon de esperanto. Laborojn bezonajn por aranĝo faris ĝen. sekretario Ŝustr, kiu meritas apartan dankon pro zorge kaj sukcese farita laboro. Estas rimarkinda la fakto, ke tiaj prelegvojaĝoj fariĝas ĉe ni kutima institucio. Jam en februaro 1934 komencis nova prelegvojaĝo do java-ano Haĝi Mustafa Raden. Tiaj prelegantoj signifas por ĉiu loko eksterordinaran eblecon de propagando. Tion atestas pluraj konfirmoj de samideanoj, aranĝintaj ilin. La tre konvinka pruvo pri utileco kaj bezono de tiuspecaj prelegoj estas, ke ni ricevis tiom da petoj pri prelego de Kola Ajayi, ke ni povis aranĝi duan lian vojaĝon. Nur la malsano kaj aliaj malhelpoj de la simpatia negro malebligis tiun entreprenon.

**19. Radio** (komision-estro Ginz). Kiel ni antaŭvidis en nia lasta raporto, ni povas raporti pri multe pli granda nombro de dissendoj esprerantistaj el ĉsl. stacioj. Precipe meritas dankon samideanoj el Brno (Ŝamla, Strejčková, Kilián) kaj el Bratislava (Jukl.) Estas videble, ke daŭra persista laborado alportas

fruktojn. Ni raportis detale en 4—5 n-roj de la Bulteno pri akiritaj rezultatoj. Tie ĉi ni donas resumajn nombrojn. Estis dum 1933 E.-disaŭdigoj el Bratislava 6, el Brno 36, el Košice 1, el Moravská Ostrava 1, el Praha 1.

La prelegoj estis aŭskultataj en fremdlando de esp-istoj el tre diversaj landoj kaj al la radiostacioj venis multaj konfirmoj kaj gratuloj. Ni esprimas nian sinceran dankon al ĉiuj precipe al fremdlandaj samideanoj, kiuj helpis nin en nia klopodado, ke esp-o enpenetru la radiosferon, kien ĝi apartenas tre evidente. Kaj ni esprimu ankaŭ nian sinceran dankon al la gvidantoj de la Radio-ĵurnalo, precipe de la Brno-stacio, pro la larĝvida kompreno, kiun ili vidigas pri uzeblo de nia lingvo. — Pri uzo de mallongaj ondoj ni ankaŭ tiun ĉi jaron atentigadis niajn radio-amatorojn senrezulte.

**20. Turismo** (komision-estro dr. Pitlík). La dua internacia somerrestadejo en Lázně Bělohrad, aranĝita de la loka klubo, havis kontentigan sukceson spite malfavora internacia situacio, kiu tre malfaciligas la vojaĝadon. — Ni dissendadis al petintoj la gvidfolion pri Praha. Ĝi venis al pluaj tre taŭgaj adresoj. Al korespondaĵoj, venintaj pro ricevo de la Pribina broŝuro, ni sendigis la gvidfolion de Bratislava. — Dr. Pitlík finredaktis la esperantlingvan prospekton por la III-a laborista olimpiado en Praha 1934. — Niaj membroj ofte disponiĝis sin al esp-istoj venintaj el fremdlando, gvidante kaj informante ilin laŭbezone.

**21. Stacidomaj tabuloj.** Tiun ĉi jaron estis efektivigita ideo, kiu jam delonge estis diskutata. La iniciato venis siatempe de anoj de GEL. Jam antaŭ 6 jaroj ni ricevis de la fervoja ministerio permeson elpendigi sur stacidomoj tabulojn kun indiko pri adresoj de delegitoj, por ke fremda esperantisto veninta sen jarlibro aŭ iu adresaro trovu taŭgan adreson. La studo da la afero montris, ke praktike kaj propagande povas la ideo havi signifon, nur se ĝi estos efektivigita en taŭga skalo. Tio okazis nun. Ni ricevis novajn permesojn, faris interkonsenton kun Magistrála kaj fabrikigis grandan provizon de belaj tabuloj. La detaloj estas en B. sur p. 10. kaj 34. Ĝis nun pendas la tabuloj en ĉ. 50 stacidomoj. Se oni sukcesos, ke pendu la tabuloj en kelkaj centoj da stacidomoj, estos farita tre grava faro samtempe por propagando kaj por turista vizito el fremdlando. La ofero, kiu por tio estas postulata de la lokaj grupoj, estas minimuma. La prezo de la tabulo estas 26 Kč kaj por ĉiu plua jaro 6 Kč pago por pendo. La entreprenon sukcese gvidis O. Ginz.

**22. Informado de fremdlando pri situacio de niaj ŝtato kaj nacio.** Ni informis sur p. 32 kiamaniere uzis niaj anoj la Pribina-festojn por diskonigi laŭverajn informojn en fremdlando. Korespondaĵo veninta de ricevintoj de la broŝuro kaŭzis respondojn, kiuj povis klarigi diversajn detalojn de nia nacia kaj ekonomia situacio.

**23. Literaturaj aferoj** (komison-estro Hromada). Ni zorgis, ke aŭtoroj tradukitaj en esperanton, estu pri tio taŭge informitaj. Responde ni ricevis de ili kelkajn sufiĉe gravajn deklarojn. — La eldono de la Ĉeĥoslovaka antologio estas garantiita per decido de eldonisto de AELA. Hromada redaktas la libron. La eldonisto de la Literatura mondo meritas de ni dankon pro kompleza agado kaj ni varme rekomendas al niaj membroj aboni Literaturan mondon aŭ aliĝi kiel anoj al AELA. Nia kasisto Sklenčka estas ĝia reprezentanto en Ĉeĥoslovakio kaj volonte sendos prospekton.

**24. Sciencaj aferoj** (komision-estro Kamaryt). Laŭ iniciato de dr. Wüster ni korespondas kun Ĉeĥoslovaka elektroteknika asocio pri enkonduko de esp-o kiel normiga lingvo por celoj de Internacia Elektro-Komisiono. La estro de la komisiono kaj inĝ. R. Novák el Plzeň kontaktis kun pluraj koncernaj aŭtoritatuloj ĝis nun sen sukceso. Sed ni persekutas la aferon seninterrompe. — Ni kontrolis diversajn manuskriptojn kaj konsilis al la aŭtoroj. Ni estis ankaŭ petitaj pri kritika decido en disputo pri kvalito de esperanta traduko kaj ni tre ĝojis ekscitinte, ke nia vidmaniero estis akceptita de la ambaŭ partioj. — La manuskripton de dr. Kamaryt pri historio de la movado en Ĉeĥoslovakio por Enciklopedio de Esperanto legis prez. de GEL inĝ. Scholze, dr. Pitlík, Hromada, Bouška. Ankaŭ nomaro por elekto de biografietoj okazis kun scio de GEL.

**25. Junularo** (komisionestro V. Echtner). La komisiono celas veki kaj konservi intereson pri E. ĉe junularo, precipe lerneja. La tasko estas efektivigata per korespondado kaj aliaj interrilatoj kaj estas plenumata jam du jarojn. El la 88 akiritaj adresoj, 9 malaktualiĝis, restas 79 adresoj. Alvenis 60 korespondaĵoj, foriris 91 krom 241 diversspecaj, laŭeble efikaj, elektitaj varbaj presaĵoj. Enhavo de la korespondado: mendoj de libroj, insignoj k. a. e-aĵoj, adresoj por internacia korespondado, korekto de lingvaj eraroj, traduko de malpli konataj vortoj. — En septembro la Komisiono helpis aranĝi E.-ekspozicion por skoltoj en Uherský Brod per sendo de taŭga materialo. Cirkuleron pri adresaro de la Korespondo-Oficejo, Berlin respondis 15 junuloj per aliĝo. — La komisiono klopodis vane por trovi gvidanton de la Studenta sekcio.

Praha 17-an de februaro 1934.

*D-ro St. Kamaryt, prezidanto de ĈAE.*

---

**Esperantista Klubo en Praha II.,** Národní 20 a
ekspedas por antaŭa pago (en poŝtmarkoj):
1) serion de foto-poŝtkartoj kun 6 belaj diversaj bildoj de Praha kun esp-a teksto, por . Kč 4·10
2) poŝtkartojn kun lasta portreto de Zamenhof, 10 pec. . . . . . . . . . . . . . . . Kč 3·50
3) rondan esp. insignon (indiku ĉu pinglon, butonon aŭ broĉon) por . . . . . . . . . Kč 5·—

# Financa raporto pri 1933

## XIV. administra jaro de ĈAE.

| | | | Aktivoj | | Pasivoj | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| | Kč | h | Kč | h | Kč | h |
| **Ferma bilanco:** | | | | | | |
| 1. Mono en la kaso | | | 61 | 10 | | |
| 2. Mono en la Pošta Šparkaso en Praha | | | 1.114 | 40 | | |
| 3. Mono en Záložna peněžního úřednictva | | | 3.125 | 50 | | |
| 4. Inventario (post depreno de la amortizo) | | | 1.980 | — | | |
| 5. Diversaj entrepenoj: | | | | | | |
| Ĉeĥoslovaka numero de Literatura Mondo | 188 | — | | | | |
| Stacidomaj tabuloj | 1.323 | 80 | | | | |
| Ĉeĥoslovaka Antologio | 217 | 50 | | | | |
| Slovakaj eldonaĵoj | 45 | 50 | 1.774 | 80 | | |
| 6. Disvendotaĵoj | | | 1.252 | 65 | | |
| 7. Diversaj Debitoroj kaj Kreditoroj: | | | | | | |
| a) Fondaĵoj: | | | | | | |
| por kandidatoj de ŝtataj ekzamenoj | 615 | 60 | | | | |
| por establo de propra oficejo | 647 | 20 | | | 1.262 | 80 |
| b) Ceteraj | | | 2.000 | 55 | 2.093 | 50 |
| 8. Transitivoj: | | | | | | |
| 7/10 de la imposta ekvivalento | 199 | 80 | | | | |
| pagitaj presaĵoj uzotaj nur en 1934 | 911 | 30 | 1.111 | 10 | | |
| kotizoj pagitaj por 1934 | | | | | 223 | — |
| 9. Asocia Kapitalo | | | | | 8.840 | 80 |
| | | | 12.420 | 10 | 12.420 | 10 |
| **Bilanca Perdo-Gajno:** | | | | | | |
| 1. Membraj kotizoj | | | | | 6.300 | — |
| Membraj kotizoj — Studenta Sekcio | | | | | 192 | — |
| 2. Elspezoj de administrado: | | | | | | |
| a) afranko | 1.494 | 10 | | | | |
| b) materialo | 261 | 65 | | | | |
| c) vojaĝoj | 523 | 40 | | | | |
| d) impostoj | 39 | 20 | | | | |
| e) riparoj de maŝinoj | 322 | 70 | | | | |
| f) ceteraj | 94 | 50 | 2.735 | 55 | | |
| 3. Elspezoj de propagando: | | | | | | |
| a) afranko | 847 | 15 | | | | |
| b) materialo | 150 | — | | | | |
| c) gazetelfondaĵoj | 420 | — | | | | |
| d) Bulteno . . . No 48 312·50 | | | | | | |
| No 49 1.300·40 | | | | | | |
| No 1/5 3.180·80 | 4.793 | 70 | | | | |
| e) junulara sekcio | 114 | 50 | 6.325 | 35 | | |
| 4. Diversaj entreprenoj | | | 282 | — | 1.660 | 20 |
| 5. Disvenditaĵoj | | | | | 335 | 80 |
| 6. Administraj elspezoj de la Studenta Sekcio | | | — | — | | |
| 7. Diversaj elspezoj kaj enspezoj | | | 498 | — | 193 | 70 |
| | | | 9.840 | 90 | 8.681 | 70 |
| Bilanca perdo | | | | | 1.159 | 20 |
| | | | 9.840 | 90 | 9.840 | 90 |
| **Asocia kapitalo:** | | | | | | |
| Stato la 1-an de januaro 1933 | | | | | 10.784 | 90 |
| Dotaĵo al fondaĵoj | | | 784 | 90 | | |
| Bilanca perdo | | | 1.159 | 20 | 1.944 | 10 |
| Stato la 31-an de decembro 1933 | | | | | 8.840 | 80 |

Nombro de kasaj dokumentoj . . . 262
Jara spezo (unuobla) . . . Kč 75.064·25

*Hradec Králové, 31. Decembro 1933.*

*Otto Sklenčka,*
kasisto.

# AL ĈIUJ!

Post paso de iom da tempo ni nun revenas al niaj amikoj kun denova kora invito al kunlaboro en la Gazeta Servo de ĈAE.

Ĉi tiu nova alvoko kompreneble ne signifas, ke ni malkontentas pri iro de niaj laboroj. Aliloke — en la jara raporto Asocia — vi trovas la brilajn ciferojn, kiuj tre klare parolas, ke ni firme tenas en la manoj la gvidon de ĉi tiu ekstreme grava laboro.

Ni ŝparos ĉi tie ripeton, kiel necese estas atenti la nacilingvan gazetaron kaj kiel bezona estas klopodo por ĝia varbo.

Ni devas danki niajn kunlaborantojn por la persisto ĝisnuna kaj peti ilin, ke ili daŭrigu sian utilan agadon. Grandan meriton por la movado havas tiuj sennomaj laborantoj. Daŭre alvenas de ili publikaĵoj sen informo, kiu estis la aŭtoro aŭ instiganto. Pro multaj kialoj ni ŝatas tiun noblan sintenon: Ni scias, ke ni per cito de iuj nomoj ne bone servus la modestan karakteron de la samideanoj, ni agus ankaŭ maljuste kontraŭ la ceteraj diligentaj amikoj kaj ĉefe ne estas tre oportune montri al la publiko, ke iu parto de artikoloj aperis laŭ instigo esperantista kaj ne laŭ propra iniciato de la redakcioj. Anstataŭ akcepti publikan dankon, ili kontentiĝu per konscio pri bone farita laboro.

Al tiu grava, sed simpla kaj agrabla laboro ni invitas niajn membrojn ankoraŭ ne partoprenantajn. Ni antaŭe dankas kore por la afabla preteco helpi, sed ni devas atentigi, ke ne ĉiun aliĝon ni povas akcepti, havante jam kunlaborantojn en multegaj lokoj. Tamen neniu hezitu sendi sian deklaron. Se ni povos uzi la afablan proponon, ĉiuj venontaj cirkuleroj de G. S. iros jam regule al la nova kunlaboronto. Se ne povos okazi tiel, ni konservos la adreson por eventuala posta utiligo.

Anoncu sin nepre ankaŭ ĉiuj ĝisnunaj membroj de G. S. kaj ebligu tiel kontrolon de nia adresaro.

Ĉiu esperantisto ĉeĥoslovaka konsideru tamen sia devo la plenumon de jena tasko: Sendadu al ni ĉion, kion vi legas pri internacia lingvo en ĉeĥoslovakaj gazetoj. Ni rekomendas ne daŭrigi similajn privatajn aŭ grupajn kolektojn, sed konsideras grave starigi unu centran arkivon por la tuta ŝtato, kiu ne estas sole arkivo, sed plej utila helpilo en propaganda laboro.

Bonvolu uzi la suban aliĝilon.

*Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.*

---

## *ALIĜILO POR GAZETA SERVO DE ĈAE.*

### *Al Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, Praha XIX., Uralské nám. 447.*

*Mi estas preta kunlabori en Gazeta Servo kaj petas por la okazo, ke vi ne havas ankoraŭ laboranton en mia loko, alsendon de instrukcioj kaj regulan liveron de la koncernaj cirkuleroj.*

*Mi volas labori en jena(j) gazeto(j):* ..............................................................

..............................................................................................................

*Mi sendados al vi laŭeble ĉiujn artikolojn pri internacia lingvo, kiujn mi trovos en ĉeĥoslovaka gazetaro.*

*En* .............................. *la* .............................. *193*

*Subskribo kaj adreso:*

..............................................................

# Informaj tabuloj pri Esperanto.




*La tabulo en stacio Prešov.*

La apuda rapide farita bildo ne prezentas al vi en sufiĉa klaro la aspekton de la brila tabulo, kiu jam servas en plejparto de gravaj stacidomoj de nia respubliko kaj kiu ornamas multajn klubejojn. Fervoraj samideanoj plurloke ĝin fiksis ankaŭ ĉe siaj loĝejoj.

Pruviĝas la pravo de la malnova konstato pri forta valoro de samaspektaj reklamiloj grandnombraj. La multfoje revokita impreso per ripete vidata samforma tabulo kun kvinpinta stelo verda kaj voko: „ESPERANTO-INFORMO" restas en la menso de la multaj pasantoj. Apenaŭ oni povas imagi pli taŭgan lokon por atentigi pri nia vivo, ol estas la stacidomoj. La tabuloj plenumas tie perfekte sian unuan celon — konduki la vojaĝantajn esperantistojn al plej proksima informejo — kaj daŭre atestas, ke ankaŭ tiu loko tenas alte la verdan standardon. La fervoja ministerio, permesante la fikson en la stacidomoj, montris bonan komprenon al niaj klopodoj.

Nian instigan laboron provas nun sekvi aliaj ŝtatoj. Ni estu feliĉaj, se nia ekzemplo kaŭzos grandan manifeston de verda stelo en la tuta mondo.

Ni donas nun ĉiun utilan detalon:

La lada dukolora tabulo 420x297 mm kun premitaj verda stelo kaj surskribo ESPERANTO-INFORMO kaj kun pentrita loka adreso estas ekspedata post ricevo de Kč 26·—. Ricevinte tiun sumon, zorgas ĈAE ankaŭ pri fikso en la stacidomo (utilos, se vi interkonsentiĝos kun la staciestro pri preciza loko) kaj pagos ĝis fino de kuranta jaro la sumon por ĝia lokigo. Pagotaj estas poste ĉiam en oktobro Kč 6·— por jaro venonta sen plua atentigo por ŝpari neutilajn elspezojn korespondajn.

Se vi deziras la tabulon por alia supre menciita celo (klubo, loĝejo ktp.), ĝi povas fariĝi via posedaĵo por Kč 15·—. Kun via adreso ĝi kostos Kč 20·—. La livero okazas afrankite.

Adreso surpentrota devas esti plej konciza (5—6 vortoj). Por teksto pli longa alpagu 5—10 Kč.

Por via mendo uzu la suban formulon, kiès enhavon bonvolu atente sekvi.

*Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.*

---

## *MENDILO DE INFORMA TABULO.*

### *Al Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, Praha XIX., Uralské nám. 447.*

*Mi mendas por la stacidomo(j):* ......................................................

*..................tabulo(j)n po Kč 26·— kaj mi sendas la sumon de Kč.................... per poŝta blankopagilo al la konto n-ro 9602 de Svaz československých esperantistů, Praha. Por ŝpari, mi ne uzas alian pagmanieron.*

*Mi deklaras, ke mi ĉiujare ĝis fino de oktobro sen ia admono pagos Kč 6·— por la venonta jaro po ĉiu tabulo. Mi anoncos plej malfrue ĝis 1-a de septembro, se mi ne deziros dum venonta jaro havi la tabulon en la stacidomo.*

*Mi mendas krome por alia celo (klubo, loĝejo ktp.) ..........tabulo(j)n kun malplena adresa spaco po Kč 15·—, kun jena teksto:*......................................................

*po Kč 20·—. La sumon de Kč.................... mi sendas laŭ supra maniero.*

*Por pli longa teksto mi alpagas samtempe Kč....................*

*En..................................................la....................................193.....*

*Subskribo kaj adreso, eventuale kun kluba stampo:*

......................................................